**Komputeko** estas mallongigo de prikomputila terminokolekto. En tiu ĉi dua eldono aperas 7.800 komputil-rilataj kapvortoj en la usonangla lingvo kun traduko al Esperanto. Kompare kun la unua eldono estas pli ol 500 aldonoj kaj modifoj.

Troviĝas en tiu ĉi verko ankaŭ kelkpaĝa multlingva vortareto (usonangla, nederlanda, franca, ĉeĥa) kun kapvortoj en Esperanto kaj kelkaj paĝoj kun bildoj kaj klarigoj.

Komputeko ne celas anstataŭi ekzistantajn iniciatojn (kiel Komputada Leksikono kaj ReVo), sed male ilin plifortigi, plifaciligante la aliron al diversaj fontoj kaj komparante elektojn kaj proponojn de diversaj vortaroj.

La projekto Komputeko volas — en Esperanto, sed ankaŭ en aliaj lingvoj — stimuli ĝustan lingvouzon kaj kontraŭi la uzadon de (ofte fuŝa formo de) usonangla termino. Mi rimarkis ke tre ofte esperantistoj uzas anglajn vortojn kiam ili parolas pri komputil-rilataj aferoj, simple ĉar ili ne konas, nek facile trovas taŭgajn tradukojn en Esperanto. La vortoj ekzistas; vi ilin trovas en tiu ĉi libreto.

Jenaj tradukteamoj konfirmis uzi la Komputekon kiel unu el la ĉefaj fontoj por sia tradukado: Drupal (Chuck Smith), Ipernity (Paul Peeraerts), Facebook, OpenOffice.org (Tim Morley), Firefox (Eduardo Trápani), KDE, Joomla kaj liberaprogramaro.net (Cindy McKee).

Aĉetu tiun ĉi libreton ne nur ĉar vi trovos en ĝi fidindajn tradukojn el praktiko por prikomputilaj terminoj, ne nur ĉar vi volas subteni la projektojn de la organizo E@I (Edukado@Interreto), ne nur por kompletigi vian kolekton de Esperanto-vortaroj, sed ankaŭ por uzi ĝin kiel varbilon; por montri al neesperantistoj bonkvalite presitan pruvilon ke Esperanto estas moderna lingvo per kiu eblas absolute ĉion esprimi.

**www.komputeko.net**

*Komputeko estas nemalhavebla praktike orientita verko. Ĝi estas riĉa kaj ĝisdata fonto de terminoj de tre aktuala kaj rapide evoluanta fako.*
**Bertilo Wennergren,** Direktoro de la Sekcio pri Ĝenerala Vortaro en la Akademio de Esperanto.

*Por revuo kiel MONATO, kiu traktas tre aktualajn temojn, mi nepre bezonas fidindajn ĝisdatajn terminarojn. Komputeko plene respondas al tiu bezono.*
**Paul Peeraerts,** administra sekretario de Monato.

9 788089 366149
ISBN 978-80-89366-14-9

Yves NEVELSTEEN KOMPUTEKO

Angla-Esperanta prikomputila terminaro

Dua, plibonigita eldono

# KOMPUTEKO

prikomputila terminokolekto



Second, improved edition

English-Esperanto Computer Dictionary

esperoj